

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Vi aŭdas radioprelegaron redaktita antaŭ kvin jaroj de nia antaŭulo Charles Ecabert kaj dediĉita al grandaj svisaj pedagogoj.

A.- Dum la lasta prelego Charles Ecabert parte pristudis la edukadan verkon de Rousseau *Emilo*, kaj precize ties du unuajn librojn, kiuj rigardas la junuleton dum la infaneco ĝis la 12-jaraĝo. « Libereco kaj feliĉo, diras Charles Ecabert, estas la du regantaj temoj de la pedagogio de Rousseau. Ni rimarku ankoraŭfoje, ke feliĉo dependas de libereco en tiu senco, ke la infano estu edukata al tiu ideo pri sia libereco, ke ĝi ne estas senlima, nek senkondiĉa, sed male ke ĝiaj limoj estas liaj naturaj fortoj.

Cl.- « *Nenio trans la naturaj fortoj.* »

A.- La tuta edukado celu al tiu fundamenta vero. Tiam kaj tiel la infano plene disfloros kaj estos feliĉa.

Cl.- Objekto de nia hodiaŭa studo, daŭrigas Charles Ecabert, estos la tria libro de Emilo. La tria pritraktas la mezan aĝon de 12 ĝis 15 jaroj. La junulo malfermiĝas antaŭ la ekstera mondo kaj akiras amason da konoj. Ĉi tie do ni trovas la penson de Rousseau pri didaktiko kaj metodologio.

A.- Inter sennombraj sciindaĵoj oni faru elekton. Solaj estas proponendaj al la infano tiuj, kiuj reale kontribuos al lia bonstato. Bonega principo kiun oni povus apliki ankoraŭ nun, kiam la plej taŭgaj kompetentuloj akre plendas pri la **frenezaj lernoprogramoj**.

Cl.- Moderna pedagogio ŝuldas al Rousseau fundamentan dogmon, laŭ kiu la infano estu metata antaŭ la okazaĵojn, antaŭ la fenomenojn tiel, ke lia scivolemo vekigu. Se la infano faros al si mem demandojn, la instruo penetros en lin mem.

A.- « *Turnu la atenton de via lernanto, konsilas Rousseau, sur la naturajn fenomenojn, baldaŭ vi faros lin scivolema. Igu la demandojn al li kompreneblaj, kaj lasu, ke li mem ilin solvu. Nenion li sciu pro tio, ke vi klarigis ĝin, sed pro tio, ke li mem komprenis ĝin. Sciencon li ne lernu, sed elpensu.* »

Cl.- Nekalkuleblaj estas la feliĉaj sekvoj de tiu nova metodo, anstataŭiginta majstran eldevigon per la memkonvinkiĝo antaŭ la faktoj, antaŭ la vero. Necesas, ke la edukanto sin metu je la loko de la infano.

A.- « *Neniam ni kapablas, diras Rousseau, nin meti je la loko de la infanoj, ni ne eniras en iliajn ideojn, sed pruntedonas niajn al ili, kaj ĉiam daŭrigante niajn rezonadojn per ĉeno de veroj ni nur amasigas ekstravagancojn kaj erarojn en iliajn kapojn.* »

Cl.- Aparte abomenas Rousseau la pervortajn klarigojn.

A.- « *Junuloj ne multe atentis tiajn kaj ilin ne longe memortenas. Realajojn, realajojn ! Mi neniam sufiĉe rediros, ke ni troan povon donas al la vortoj ; per nia babilema edukado ni faras nur babilemulojn.* »

Cl.- Rousseau volas, ke Emilo kritiku kaj pesu la kialon de la lernakiraĵoj.

A.- « *Je kio ĝi utilas. Tuj kiam ni sukcesis doni al nia lernanto ideon pri **utilo**, ni havas pluan prenon por lin konduki, ĉar tiu parolo lin ege frapas tial, ke ĝi havas por li sencon relativan je lia aĝo, kaj li klare vidas la rilaton al sia nuna bonstato.* »

Cl.- Emilo, kaj tio estas signifoplena, devas lerni metion, veran metion en kiu manoj pli laboras ol kapo, kiu ne kondukas al riĉeco, sed per kiu oni povas mizeron malhavi. Ĉar, laŭ Rousseau, manlaboro junulon honorigas kaj levas je la homa stato. En la kvara libro temas pri morala eduko. Junulo edukita meze de bona simplanimeco ja estas grandanima kaj nobla.

A.- « *Juneco, diras Rousseau, estas aĝo nek de venĝemo nek de malamo, sed de kompatato, pardonemo kaj malavareco.* »

Cl.- Edukenda sento estas kompatato, la unua emo kiu, laŭ natura ordo, fontas el la homa koro. Por kompatemiĝi sciu la junulo, ke ekzistas estaĵoj, kiuj suferas, kion li suferis, kiuj provas dolorojn, kiujn li mem provis aŭ povas ankaŭ provi.

A.- « *Ni nur kapablas kompati forirante el ni mem kaj identigante nin kun tiuj, kiuj suferas, forlasante, se oni povas tiel diri, nian eston por alpreni ilian.* »

Cl.- Grandan parton de la kvara libro okupas la fama kredokonfeso de la savoja vikario, kiu al Rousseau altiris tiomajn persekutojn. Je tri punktoj resumiĝas la religia filozofio de Rousseau :

A.- « *Unue, iu volo movas mondon kaj animas naturon. Due, leĝoj regas naturon, do ekzistas superega inteligenteco. Trie, homo estas libera pri sia ago, do animata per nemorta substanco.* »

Cl.- Profunde religia estis Rousseau kaj pro tio lin persekutis Voltaire kaj liaj amikoj enciklopediistoj, kiuj kuniĝis, mirinde, kun la ĝeneva registaro kaj eklezio por lin konsterni kaj fuĝigi tra tuta Eŭropo. Konklude ni aŭdu lian altmensan himnon al konscienco; ĝi enkalkuliĝas inter la plej noblaj paĝoj de la homa literaturo:

A.- « *Konscienco, konscienco, dia instinkto nemorta kaj ĉiela voĉo, fidinda gvidanto de estaĵo nescianta kaj limigita, inteligenta kaj libera, juĝisto neerara pri bono kaj malbono, kiu similigas homon al Dio, vi distingigas lian naturon kaj moraligas lian agadon. Sen vi mi nenion en mi sentas, kiu min levas super la bestoj, nur la bedaŭrindan privilegion erari pli kaj pli fare de senregula intelekto kaj senprincipa racio.* »

Cl.- Vi aŭdis prelegon de Charles Ecabert. Parolis Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-